

Leçon 6



Co-funded by the Erasmus+ Programme of the European Union



Ce projet est financé avec le soutien de la Commission européenne. Cette publication ne reflète que le point de vue de l'auteur, c'est pourquoi la Commission ne peut être tenue responsable de l'utilisation des informations qui apparaissent ici.

Tous les contenus, sauf indication contraire explicite, appartiennent à *lernu.net* et sont publiés sous licence Creative Commons Attribution - Pas d'Utilisation Commerciale - Partage dans les Mêmes Conditions 4.0 International (CC BY-NC-SA 4.0).

<https://lernu.net/instruado?lang=fr>

▼ Grammaire



Expression de souhait.

La terminaison **-u** des verbes n'est pas utilisée uniquement pour l'impératif, mais également dans les subordonnées lorsque le verbe de la proposition principale indique un ordre ou un désir (deziri, voli, postuli) et que la subordonnée est introduite par la conjonction **ke**.

Mi deziras, ke vi lernu. = Je désire que tu étudies.

La patro volas, ke mi iru. = Le père veut que j'y aille.

je

La préposition **je** est nommée «préposition joker». Elle n'a pas de signification précise et peut être utilisée quand aucune autre préposition ne convient. Elle est souvent utilisée avec les expressions du temps.

Je kioma horo vi venos? = À quelle heure viendrez-vous ?

Je la kvina horo. = À cinq heures.

farti

On utilise couramment ce verbe dans l'expression suivante.

Kiel vi fartas? = Comment vas-tu ? Comment allez-vous ?

-eg-

Le suffixe **-eg-** est un augmentatif.

librego = un gros livre

bonega = excellent

varmega = brûlant, torride

homego = une grande personne

belega = magnifique, superbe

-et-

Le suffixe **-et-** est un diminutif.

libreto = un livret

varmeta = tiède

beleta = mignon

hometo = une petite personne

-iĝ-

Le suffixe **-iĝ-** signifie devenir ..., se faire ...

riĉiĝi = s'enrichir (= devenir riche)

trankviliĝi = se calmer

resaniĝi = guérir

geedziĝi = se marier

▼ Unité 25 (sessions 49-50)



Objectifs pédagogiques

- Apprendre les nouveaux affixes **-ET-** et **-EG-**
- Réviser la grammaire des leçons précédentes
- S'entraîner à la compréhension orale

Matériel pédagogique requis

- Ordinateur pour jouer des fichiers audio

Préparation

- Exercice **M1**
- Exercice **M2**
- Exercice **M3**
- Réponses **M4**
- Exercice **M5**
- Réponses **M6**
- Exercice **M7**
- Copies de **M8**
- Copies de **M9**

Mots nouveaux

ridi = rire

rideti = sourire

troviği = se trouver

Plan du cours

10 min Distribuez l'exercice **M1**. Utilisez l'image pour expliquer l'exercice et la signification des suffixes **-ET-** et **-EG-**. La partie « Faites-le vous-même » est à faire individuellement. Votre tâche est de contrôler les réponses.

10 min Distribuez l'exercice **M2**. Demandez aux élèves de créer des phrases avec les suffixes **-ET-** et **-EG-**.

5 min Récréation

20 min Distribuez l'exercice **M3**. Jouez le son **1** et écoutez ensemble le dialogue deux fois.

Les élèves doivent faire le bon choix selon ce qui se passe dans le dialogue : est-ce que cela parle de nourriture, de photo ou d'école (la bonne réponse est la B). Ensuite, ils écoutent le dialogue une nouvelle fois et finissent les phrases.

Les réponses sont en **M4**.

10 min Pause

10 min Distribuez l'exercice **M5**. Demandez aux élèves d'ajouter le suffixe **-ET-** et **-EG-** en fonction de celui qui a du sens dans la phrase donnée.

Les réponses sont en **M6**.

10 min Distribuez l'exercice **M7**. Chaque élève crée trois phrases en utilisant les mots du tableau. L'élève peut utiliser plusieurs mots du tableau dans chaque phrase.

5 min Récréation

5 min Ensemble, chantez la chanson **M8** 2 ou 3 fois.

Donnez les devoirs à faire à la maison.

M1 Exercise



dometo



domo




domego



bicikleta



biciklo



biciklego



rideti



ridi



ridegi

Faites-le vous-même. À partir des racines suivantes, formez de nouveaux mots en prenant modèle sur les exemples donnés ci-dessus.

<

aŭt _____

dom _____

man _____

libr _____

kuk _____

frat _____

vizaĝo _____

pied _____

strat _____

paper _____

-

aŭt _____

dom _____

man _____

libr _____

kuk _____

frat _____

vizaĝo _____

pied _____

strat _____

paper _____

>

aŭt _____

dom _____

man _____

libr _____

kuk _____

frat _____

vizaĝo _____

pied _____

strat _____

paper _____

M2 Exercice

Formez de mots nouveaux à l'aide des suffixes **-et-** ou **-eg-**.

malgranda kapo	→	kapeto
granda piedo	→	piedego
malgranda domo	→	
granda fiŝo	→	
granda muro	→	
malgranda botelo	→	
malgranda papero	→	
granda ĉambro	→	
malgranda piedo	→	
granda vendejo	→	
granda kapo	→	
malgranda libro	→	

M3 Exercice

Écoutez le dialogue deux fois. Choisissez la bonne réponse.

Ivo kaj Peter parolas pri ...

a) manĝoj

b) fotoj

c) lernejo

Ivo Ho, kiom granda foto! Kiuj estas tiuj homoj sur ĝi?

Peter Sur la _____ troviĝas mi, miaj gepatroj kaj miaj gefratoj.

Ivo Kiu fotis ĝin?

Peter Unu _____, kiu loĝas en urbocentro.

Ivo Ĉu li bone laboras?

Peter Jes, lia _____ estas ĉiam tre bona, _____.

Ivo Ĉu ankaŭ tiujn ĉi etajn fotojn li faris?

Peter Kompreneble, li faris multajn. Jen, vidu, li sendis ilin al ni ankaŭ per interreto.

Ivo _____. La knabino sur la foto, kiu _____, havas tre simpatian vizaĝon.

Peter Ŝi estas mia fratino. Ŝi havas _____ kaj ŝi ŝatas kanti.

Ivo Kion havas la knabeto en la manoj?

Peter Mi _____. Tio okazis antaŭ longa tempo.

Ivo Mi ĝojas, ke vi montris al mi la fotojn. Kiam mi venos hejmen, ankaŭ mi serĉos _____.

Peter Bonege! Certe ili plaĉos al ĉiuj.

- Ivo** Ho, kiom granda foto! Kiuj estas tiuj homoj sur ĝi?
- Peter** Sur la **grandega foto** troviĝas mi, miaj gepatroj kaj miaj gefratoj.
- Ivo** Kiu fotis ĝin?
- Peter** Unu **fotisto**, kiu loĝas en urbocentro.
- Ivo** Ĉu li bone laboras?
- Peter** Jes, lia **laboro** estas ĉiam tre bona, **bonega**.
- Ivo** Ĉu ankaŭ tiujn ĉi etajn fotojn li faris?
- Peter** Kompreneble, li faris multajn. Jen, vidu, li sendis ilin al ni ankaŭ per interreto.
- Ivo** **Interese**. La knabino sur la foto, kiuridetas, havas tre simpatian vizaĝon.
- Peter** Ŝi estas mia fratino. Ŝi havas **belegan voĉon** kaj ŝi ŝatas kanti.
- Ivo** Kion havas la knabeto en la manoj?
- Peter** Mi **ne scias**. Tio okazis antaŭ longa tempo.
- Ivo** Mi ĝojas, ke vi montris al mi la fotojn. Kiam mi venos hejmen, ankaŭ mi serĉos **malnovajn fotojn**.
- Peter** Bonege! Certe ili plaĉos al ĉiuj.



M5 Exercice

Complétez les trous avec l'élément qui convient : **-et-**, **-eg-**.

La fotisto faras tre bonajn fotojn. Li laboras bon_____e.

Ivo sur la foto ridas, sed Ana nur rid_____as.

Ho, kiel long_____a leciono hodiaŭ! Mi volas jam iri hejmen.

Donu al mi la malgrandan paper_____on, kiun vi havas en la mano.

En nia strato oni malfermis novan malgrandan vendej_____on.

Vi havas vere malnov_____an aŭton. Ĉu ĝi ankoraŭ funkcias?

Ho, la kafo estas ankoraŭ varm_____a! Oni kuiris ĝin antaŭ du minutoj.

Marko ne volas manĝi multe. Li manĝ_____os iom.

La ruĝa aŭto estas la plej rapida el ĉiuj. Ĝi estas rapid_____a.

Rigardu, kia fort_____ulo! Ankaŭ mi volas tian forton.

M6 Réponses

La fotisto faras tre bonajn fotojn. Li laboras bone**ge**.

Ivo sur la foto ridas, sed Ana nur rid**et**as.

Ho, kiel long**ega** leciono hodiaŭ! Mi volas jam iri hejmen.

Donu al mi la malgrandan paper**et**on, kiun vi havas en la mano.

En nia strato oni malfermis novan malgrandan vende**je**ton.

Vi havas vere malnov**ega**n aŭton. Ĉu ĝi ankoraŭ funkcias?

Ho, la kafo estas ankoraŭ varm**ega**! Oni kuiris ĝin antaŭ du minutoj.

Marko ne volas manĝi multe. Li manĝ**et**os iom.

La ruĝa aŭto estas la plej rapida el ĉiuj. Ĝi estas rapid**ega**.

Rigardu, kia fort**eg**ulo! Ankaŭ mi volas tian forton.

M7 Exercice

Écrivez trois phrases en utilisant des mots suivants. Attention aux terminaisons **-j** et **-n**.

bonega	paperetoj	varmetajn
rapidegan	fortegaj	ridetas
ridegas	manĝeti	

Mi sidas

Mi sidas kaj mi skribas,

en mia lernoĉambro,

Saluton, geamikoj!

Mi lernas Esperanton.

Miaj amikoj venas

al mia bela hejmo,

vi venis nun al mi,

kaj mi salutas vin.

Mi havas lernolibrojn

sur mia skribotablo.

Mi sportas kaj laboras.

Mi lernas Esperanton.

Miaj amikoj venas

al mia bela hejmo,

vi venis nun al mi,

kaj mi salutas vin.

Mélodie : [YouTube](#)

M9 Devoir à la maison

Écrivez une histoire courte en utilisant les débuts de phrases ci-dessous.

Ĉu vi aŭdis, ke...

Per la nova biciklo volas Marko...

Iam li veturos...

Li ne scias, kiom...

Créez des phrases à l'aide de l'ordinateur. Créez 5 phrases chaque jour. Traduisez-les et écrivez-les si elles sont correctes.

▼ **Unité 26** (sessions 51-52)



Objectifs pédagogiques

- Apprendre le suffixe **-IĜ-**, qui indique une transition vers un autre état
- Utiliser le suffixe **-IĜ-** avec l'élément **pli**
- Réviser les corrélatifs
- Découvrir des proverbes espérantistes

Matériel pédagogique requis

- Ordinateur pour jouer des fichiers audio

Préparation

- Exercice **M10**
- Exercice **M11**
- Exercice **M12**
- Réponses **M13**
- Exercice **M14**
- Copies de **M15**
- Copies de **M16**

Plan du cours

20 min Distribuez l'exercice **M10**. Utilisez les images pour expliquer l'exercice et la signification du suffixe -**IĜ-** : l'objet reçoit un nouvel attribut. Les élèves créent des mots à partir des pièces de puzzle et les traduisent.

5 min Récréation

20 min Distribuez l'exercice **M11**. Demandez aux élèves de créer des verbes avec le suffixe -**IĜ-**. Commencez par les aider et expliquez-leur comment l'élément **pli** peut être utilisé (**pliboniĝis**, **plivarmiĝis** etc.).

10 min Pause

20 min Distribuez l'exercice **M12**. Écoutez l'audio **2**. Les réponses sont en **M13**.

5 min Récréation

15 min Distribuez l'exercice **M14**. Demandez aux élèves de trouver les réponses correctes aux questions. Ensuite, répartissez-les en groupes de deux et demandez-leur de jouer les dialogues.

5 min Ensemble, chantez la chanson **M15** 2 ou 3 fois.

Donnez les devoirs à faire à la maison.

M10 Exercice




varma kafo

La kafo malvarmiĝas.




malvarma kafo




junaj geedzoj

La geedzoj maljuniĝas.



maljunaj geedzoj

Créez des mots à partir des pièces de puzzle et traduisez-les en français.



M11 Exercice

Compléter en utilisant le verbe correct avec le suffixe **-iĝ-**.

bona	→	boniĝis
La afero estis malbona. Sed nun ĝi estas bona.	→	La afero iĝis bona. La afero _____.
La metodoj de laboristoj estis malmodernaj. Sed nun ili estas modernaj.	→	La metodoj iĝis modernaj. La metodoj _____.
Marko estis maltrankvila. Sed nun li estas trankvila.	→	Marko iĝis trankvila. Marko _____.
pli bona	→	pliboniĝis
La vojo estis mallonga. Sed nun ĝi estas pli longa.	→	La vojo iĝis pli longa. La vojo _____.
Interreto estis malrapida. Sed nun ĝi estas pli rapida.	→	Interreto iĝis pli rapida. Interreto _____.
La voĉoj estis malfortaj. Sed nun ili estas pli fortaj.	→	La voĉoj iĝis pli fortaj. La voĉoj _____.

M12 Exercice

Écoutez l'audio qui présente plusieurs proverbes espérantistes et ajoutez les mots manquants.

Amiko de _____ estas ankaŭ amiko.

Amo estas forta, sed mono _____.

Ĉiu _____ estas malfacila.

Edzo kaj _____ estas nur unu.

Fino bona, _____ bona.

_____ demando, tia respondo.

Mi hejme sidis, _____ vidis.

Plej bone _____, kiu laste ridas.

Pli bona estas _____, ol nenio.

Rapidu _____.

M13 Réponses

Amiko de **amiko** estas ankaŭ amiko.

Amo estas forta, sed mono **pli forta**.

Ĉiu **komenco** estas malfacila.

Edzo kaj **edzino** estas nur unu.

Fino bona, **ĉio** bona.

Kia demando, tia respondo.

Mi hejme sidis, **nenion** vidis.

Plej bone **ridas**, kiu laste ridas.

Pli bona estas **io**, ol nenio.

Rapidu **malrapide**.

M14 Exercice

Reliez les questions et les réponses. Puis jouez-les en groupe de deux.

Ĉu la interreto estas daŭre malrapida?	Ĉar mi volas vidi novajn fotojn de Julia, sed ŝi ne volas montri ilin al mi.
Kiam vi parolis kun la knabino?	Mi ne scias, al kiu. Eble al iu amiko.
Kiel malpleniĝis la botelo?	Ĉar mi manĝis kukon.
Kial vi malpuriĝis?	Ne, ĝi jam plirapidiĝis. Mi povas nun labori de hejmo kaj mi ne devas ĉiutage iri en laborejon.
Kien vi volas veturi?	Ĉiajn, nur kriminalajn ne.
Kial vi koleriĝis?	Mi forgesis fermi ĝin kaj ĝi falis.
Al kiu Marko montris malnovajn fotojn?	Ĉien, ĉar mi ŝatas viziti novajn lokojn.
Kiajn filmojn vi ŝatas rigardi?	Mi neniam parolis kun ŝi, ĉar mi ne konas ŝin.

Mi ŝatas

Mi ŝatas sporti

Jes! jes! (koruso)

Mi ŝatas lerni

Tre! tre! (koruso)

Mi ŝatas trinki

Jes! jes! (koruso)

Mi ŝatas legi

Tre! tre! (koruso)

Mi ŝatas kafon.

Mi ŝatas lingvojn.

Mi ŝatas sporton.

Mi ŝatas librojn.

Kun geamikoj,

Jes! jes! (koruso)

En mia hejmo,

Tre! tre! (koruso)

En lernoĉambro

Jes! jes! (koruso)

Kaj en hotelo

Tre! tre! (koruso)

Mi ŝatas kafon.

Mi ŝatas lingvojn.

Mi ŝatas sporton.

Mi ŝatas librojn.

Kun la gepatroj

Ĉu????? (koruso)

Mi ŝatas sporti

Jes! jes! (koruso)

Mi ŝatas lerni

Tre! tre! (koruso)

Mi ŝatas trinki

Jes! jes! (koruso)

Mi ŝatas legi

Tre! tre! (koruso)

Mélodie de la chanson « Frère Jacques »

M16 Devoir à la maison

Complétez les trous avec l'élément qui convient : **mal, et, ul, eg, ge, ebl, ind, ej, in, ist, re**. Chaque élément ne doit être utilisé qu'une seule fois.

Frato kaj fratino estas _____ fratoj.

Bonvolu _____ doni al mi mian libron.

Lernantoj havas novan instru _____ inon.

La infano ludas en infanĉambro kun aŭt _____ oj.

Ivo ne plu estas _____ forta. Li jam fortiĝis.

Mi ege ĝojas, ĉar mi ricevis leg _____ an libron.

Mi ne povas legi, kion vi skribis! Vi skribas neleg _____ e!

Kiel grand _____ a domo! Por mi sufiĉas malpli granda domo.

Kian homon vi konas? Tre bonan homon. Bon _____ on.

En urbocentro mi aĉetis 3-ĉambran loĝ _____ on.

Tie laboras la plej bona kuirist _____ o, kiun mi konas.

Créez des phrases à l'aide de l'ordinateur. Créez 5 phrases chaque jour. Traduisez-les et écrivez-les si elles sont correctes.

Solution :

Frato kaj fratino estas **ge**fratoj.

Bonvolu **re**doni al mi mian libron.

Lernantoj havas novan instru**ist**inon.

La infano ludas en infanĉambro kun aŭt**te**oj.

Ivo ne plu estas **mal**forta. Li jam fortiĝis.

Mi ege ĝojas, ĉar mi ricevis leg**ind**an libron.

Mi ne povas legi, kion vi skribis! Vi skribas neleg**eble**!

Kiel grand**ega** domo! Por mi sufiĉas malpli granda domo.

Kian homon vi konas? Tre bonan homon. Bon**ul**on.

En urbocentro mi aĉetis 3-ĉambran loĝ**ej**on.

Tie laboras la plej bona kuirist**ino**, kiun mi konas.

▼ **Unité 27** (sessions 53-54)



Objectifs pédagogiques

- Apprendre que **-IĜ-** peut être ajouté aux verbes (**fermi – fermiĝi**)
- Découvrir les nouveaux affixes **-UL-** et **-IND-**
- S'entraîner à la compréhension de la lecture

Matériel pédagogique requis

- Ordinateur pour jouer des fichiers audio

Préparation

- Exercice **M17**
- Exercice **M18**
- Réponses **M19**
- Exercice **M20**
- Réponses **M21**
- Exercice **M22**
- Copies de **M23**
- Copies de **M24**

Plan du cours

20 min

Distribuez l'exercice **M17**. À l'aide du puzzle et du tableau, expliquez le suffixe **-IĜ-** : l'objet se déplace vers un nouvel état. Jusqu'à présent, nous avons ajouté le suffixe **-IĜ-** uniquement aux adjectifs (*bona – boniĝis, granda – grandiĝis...*). Ainsi, le sujet est passé dans un nouvel état. Nous allons maintenant ajouter **-IĜ-** aux verbes pour indiquer une transition vers un nouvel état.

Les élèves travaillent en groupe et créent des mots à partir des pièces de puzzle. Ils traduisent ensuite en français.

Exemples :

La pordo MAL-FERM-IĜ-IS

La domo RE-FERM-IĜ-IS

La urbo RE-NOM-IĜ-OS

La amiko NOM-IĜ-AS

Li RE-MONTR-IĜ-AS

5 min

Récréation

20 min

Distribuez l'exercice **M18**. Demandez aux élèves de compléter ce texte à trous en utilisant des mots avec **-IĜ-**. Assurez-vous que les élèves comprennent bien la signification des mots dans la boîte.

Les réponses sont en **M19**.

10 min

Pause

10 min

Distribuez l'exercice **M20**. Répartissez les élèves par groupes de deux. Chaque groupe remet les parties du dialogue dans le bon ordre.

Vous pouvez rappeler aux élèves les terminaisons **-UL-** et **-IND-** sur lesquelles ils ont travaillé dans les derniers exercices.

Les réponses sont en **M21**.

10 min

Distribuez l'exercice **M22**.

5 min

Récréation

15 min

Les binômes qui ont mis **M20** dans le bon ordre vont maintenant jouer le dialogue. Ensuite, choisissez un groupe et demandez-leur de présenter le dialogue devant la classe, qui vérifiera leurs réponses.


5 min

Retournez à la chanson **M23** de la leçon 5. Demandez aux élèves de traduire la chanson et de la chanter 2 ou 3 fois.

Donnez les devoirs à faire à la maison.

M17 Exercice

Créez des mots à partir des pièces de puzzle et traduisez-les en français.



M18 Exercice

Remplissez les trous avec le verbe qui convient : *fermiĝos, alinomiĝis, fariĝis, aŭdiĝas, sidiĝu, malpleniĝis, finiĝos, troviĝas, malfermiĝis, nomiĝas, montriĝis.*

Mi aŭdis, ke la pordo de la ĉambro _____ kaj iu eniris.

La kultura filmo komenciĝos je la kvina horo kaj _____ je la sepa horo.

En la jaro 1868 (mil okcent sesdek ok) la japana urbo Edo _____ al Tokio.

Pardonu, ĉu vi povas diri al mi, kie _____ iu hotelo?

Saluton, mi _____ Petro kaj mi havas dek jarojn.

Tra la fenestro _____ forta voĉo de iu knabino.

Post dek minutoj _____ la vendejo kaj ni ne plu povos aĉeti manĝon.

_____, ke li neniel povos viziti Germanion.

Ne staru tie! _____ kaj trankvile trinku kun ni kafon aŭ sukron.

Ivo _____ ruĝa, kiam la simpatia knabino ridetis al li.

La tago finiĝis kaj la stratoj _____. Neniu homoj plu estis videblaj.

M19 Réponses

Mi aŭdis, ke la pordo de la ĉambro **malfermiĝis** kaj iu eniris.

La kultura filmo komenciĝos je la kvina horo kaj **finiĝos** je la sepa horo.

En la jaro 1868 (mil okcent sesdek ok) la japana urbo Edo **alinomiĝis** al Tokio.

Pardonu, ĉu vi povas diri al mi, kie **troviĝas** iu hotelo?

Saluton, mi **nomiĝas** Petro kaj mi havas dek jarojn.

Tra la fenestro **aŭdiĝas** forta voĉo de iu knabino.

Post dek minutoj **fermiĝos** la vendejo kaj ni ne plu povos aĉeti manĝon.

Montriĝis, ke li neniel povos viziti Germanion.

Ne staru tie! **Sidiĝu** kaj trankvile trinku kun ni kafon aŭ sukron.

Ivo **fariĝis** ruĝa, kiam la simpatia knabino ridetis al li.

La tago finiĝis kaj la stratoj **malpleniĝis**. Neniu homoj plu estis videblaj.

M20 Exercice

Formez des groupes de deux et mettez ce dialogue dans le bon ordre. Ensuite, jouez les dialogues.

1	Saluton, kial vi tiom ridas?
2	Ho, pardonu. Mi ridas, ĉar mi legas libron.
3	
4	
5	
6	
7	
8	
9	
10	

Tio povas esti leginda libro. Sed kio estas tiel ridinda?

Kian libron?

Jes. Kaj la bedaŭrindaj lokuloj restis sen tagmanĝo.

Ridinda estas tio, ke iam li vizitis interesan lokon. Kun lokuloj li volis paroli pri tio, kiel ili vivas. Sed ili volis kuir kaj manĝi lin.

En nokto, kiam ĉiuj aliaj dormis, li rapidege veturis hejmen.

Li bone faris. Homoj ne estas tre manĝindaj.

Ho! Manĝi! Ĉu vere?! Kaj kiel ĉio finiĝis?

Interesan. Ĝi estas pri homo, kiu ŝatas vojaĝi. Li vizitas ĉiam novan vidindan lokon kaj parolas kun lokuloj.

M21 Réponses

1	Saluton, kial vi tiom ridas?
2	Ho, pardonu. Mi ridas, ĉar mi legas libron.
3	Kian libron?
4	Interesan. Ĝi estas pri homo, kiu ŝatas vojaĝi. Li vizitas ĉiam novan vidindan lokon kaj parolas kun lokuloj.
5	Tio povas esti leginda libro. Sed kio estas tiel ridinda?
6	Ridinda estas tio, ke iam li vizitis interesan lokon. Kun lokuloj li volis paroli pri tio, kiel ili vivas. Sed ili volis kuiri kaj manĝi lin.
7	Ho! Manĝi! Ĉu vere?! Kaj kiel ĉio finiĝis?
8	En nokto, kiam ĉiuj aliaj dormis, li rapidege veturis hejmen.
9	Li bone faris. Homoj ne estas tre manĝindaj.
10	Jes. Kaj la bedaŭrindaj lokuloj restis sen tagmanĝo.



M22 Exercice

Reliez les parties de phrases qui correspondent. Traduisez ensuite ces phrases en français.

Ni helpos ĉiel...	...ĉiutage je la oka horo.
Lernejo komenciĝas...	...la lastan kukon.
Jen via sidloko,...	...ĉar tio estas senpaga.
Vi devas pagi neniom,...	...al la malriĉa knabo.
Neniu volas preni...	...bonvolu sidiĝi.

JoMo: Hej, belulineto!

Hej, belulineto,

Diru al mi-i-i

Ĉu vi volas min?

Kiam mi vidis vin sur la strat'

De mia kor' plifortigis bat'

Vi 'stas bela, ĉarma knabin'

Diru nun finfine ĉu vi volas min?

Nur gravas,

Nur gravas la amo ...

M24 Devoir à la maison

Créez trois phrases à partir des éléments suivants. Vous pouvez utiliser le même élément plusieurs fois dans la même phrase. Vous pouvez aussi utiliser d'autres éléments que ceux-ci.

exemple :

En la **strato trovi**gas **granda domo**.

UL	IND	EJ	IĜ	MAL
TROV	STAR	HAV	DOM	JUN
NOKT	GRAND	NAZ	PIED	DON
RIĈ	LOĜ	KNAB	VIZIT	

Créez des phrases à l'aide de l'ordinateur. Créez 5 phrases chaque jour. Traduisez-les et écrivez-les si elles sont correctes.

▼ **Unité 28** (sessions 55-56)



Objectifs pédagogiques

- Réviser les corrélatifs
- S'entraîner à parler en simulant une situation de la vie quotidienne (sketch)

Matériel pédagogique requis

- Ordinateur pour jouer des fichiers audio

Préparation

- Sons **1, 2**
- Copies de **M25**
- Copies de **M26**
- Copies de **M27**
- Copies de **M28**

Plan du cours

20 min Distribuez le dialogue **M25**.

Répartissez les élèves par groupes de deux et demandez-leur de lire le dialogue, puis de le traduire. Demandez à un binôme de le lire à haute voix puis de le traduire ligne par ligne. Aidez-les pour la traduction si nécessaire. Ensuite, demandez à ce binôme de jouer le dialogue sans le traduire. S'il vous reste du temps, vous pouvez demander à un autre binôme de jouer le dialogue.

5 min Récréation

15 min Divisez la classe en trois groupes. Demandez à chacun d'écrire autant de phrases que possible en cinq minutes. Dans chaque phrase, un groupe devra placer des mots avec **ĈI-** (**ĉiu, ĉiuj, ĉiun, ĉiujn, ĉio, ĉion, ĉia, ĉie, ĉien, ĉian**), l'autre groupe des mots avec **I-** (**iu, iun, iuj, iujn, io, ion, ie, iel, ia, ian, iel, iam**) et le troisième groupe, des mots avec **NENI-** (**neniu, nenio, neniun, nenion, neniam, neniel, neniom, nenia, nenan, neniajn, nenie, nenien**). Ensuite, chaque groupe lit à haute voix une phrase et les autres groupes traduisent et corrigent. Gagne le groupe qui aura trouvé le plus de fautes dans les phrases des autres.

5 min Ensemble, chantez la chanson **M26** 2 ou 3 fois.

10 min Pause

10 min Jouez à d'autres jeux sur les corrélatifs. Divisez les élèves en deux groupes. Chaque groupe écrit la plus longue phrase possible avec le plus de corrélatifs possible, par exemple **En kiu lernejo iuj lernantoj neniam bone lernas kaj iuj lernantinoj, kiujn ni ne ĉiam vidas, ŝatas kanti iujn malnovajn kantojn kaj saluti ĉiujn sur ĉi tiu strato....**

Les groupes écrivent des phrases durant trois minutes puis les lisent à haute voix. Les autres groupes traduisent et notent le nombre de corrélatifs correctement utilisés.

30 min Distribuez le sketch **M27**. Formez des groupes de 4 et demandez-leur de s'exercer à le jouer.

Donnez les devoirs à faire à la maison.

M25 Dialogue

- Boris** Saluton. Mi vidis vin en la parko hodiaŭ. Iun vi volis revidi. Kiun?
- Marta** Mi trankvile sidiĝis en parko dum bela tago.
- Boris** Mi volis saluti vin, sed mi tre rapidis. Mi havos ekzamenon en lernejo.
- Marta** Aha, vi devas nun lerni, ĉar vi ne lernis antaŭe. Kiujn ekzamenojn vi havas?
- Boris** Pri fiziko kaj nia lingvo.
- Marta** Tiujn lernobjektojn vi ŝatas, pri ili vi bone sukcesos. Mi esperas ke vi foje trovos tempon por instrui min pri fiziko.
- Boris** Jes, tion mi faros.
- Marta** Bone, mia sciulo. Ĝis revido.



Mi ŝatas

Mi ŝatas sporti

Jes! jes! (koruso)

Mi ŝatas lerni

Tre! tre! (koruso)

Mi ŝatas trinki

Jes! jes! (koruso)

Mi ŝatas legi

Tre! tre! (koruso)

Mi ŝatas kafon.

Mi ŝatas lingvojn.

Mi ŝatas sporton.

Mi ŝatas librojn.

Kun geamikoj,

Jes! jes! (koruso)

En mia hejmo,

Tre! tre! (koruso)

En lernoĉambro

Jes! jes! (koruso)

Kaj en hotelo

Tre! tre! (koruso)

Mi ŝatas kafon.

Mi ŝatas lingvojn.

Mi ŝatas sporton.

Mi ŝatas librojn.

Kun la gepatroj

Ĉu????? (koruso)

Mi ŝatas sporti

Jes! jes! (koruso)

Mi ŝatas lerni

Tre! tre! (koruso)

Mi ŝatas trinki

Jes! jes! (koruso)

Mi ŝatas legi

Tre! tre! (koruso)

Mélodie de la chanson « Frère Jacques »

Roloj: Marko, Ana, malbona persono/ŝtelisto, policisto

Krimo surstrate

Ana Saluton Marko, kien vi iras?

Marko En la vendejon. Mi devas aĉeti manĝojn por miaj gepatroj.

Ana Ankaŭ mi iras tien. Ni iru kune.

Marko Kun ĝojo mi iros kun vi. Ni povos multe paroli pri niaj geamikoj en la lernejo.

Ana Ĉu vi aŭdis ke iu knabo batis Marta-n , ĉar ŝi ne volis doni al li monon, kiun ŝi havis por aĉeti tagmanĝon?

Marko Mi la unuan fojon aŭdas tion nun de vi.

Malbonulo (alvenas kaj forprenas de Marko lian saketon kun mono)

Saluton! Mi ankaŭ devas aĉeti ion, kion mi ŝatas, kaj ĉar mi ne havas monon, mi prenis ĝin de vi. Ĉu ne bone?

Marko Neniu povas forpreni aferojn de aliaj homoj. Redonu al mi la saketon.

Malbonulo He, tio nun estas mia saketo kaj mi ne volas redoni ĝin.

Ana Se vi ne redonos, mi vokos policiston. Jen li iras sur la strato.

Malbonulo Ĝis revido. Mi nun rapidas.

Li kuras for)

Ana (krias)

Policisto, policisto!

(kaj ŝi kuras post la Malbonulo)

Policisto Kio okazis? Mi vidas ke iu knabino postkuras knabon.

Marko Tiu knabo prenis monon de mi. Li estas malbonulo.

Policisto Ni skribu en dokumento kio okazis. Diru al mi vian nomon?

Marko Sed la Malbonulo forrapidos kaj mi ne havos mian monon! Kuru post li.

(Ana revenas kun Malbonulo, kiun ŝi forte tenas je la mano.)

Malbonulo Lasu min. Mi ne volas paroli kun la policisto.

Ana Jen la malbonulo. Mi estis pli rapida ol li.

Policisto Ĉu tio estas via saketo?

Malbonulo Jes, jes, jes.

Ana kaj Marko Li diras malveron.

Marko En ĝi estas mono de miaj gepatroj kaj mia lerneja dokumento.

Policisto Malbonulo. Nun vi iros kun mi al la policejo.

M28 Devoir à la maison

Créez des phrases à l'aide de l'ordinateur. Créez 5 phrases chaque jour. Traduisez-les et écrivez-les si elles sont correctes.

▼ **Unité 29** (sessions 57-58)



Objectifs pédagogiques

- Réviser les corrélatifs
- Revoir la grammaire des leçons précédentes
- S'entraîner à parler en simulant une situation de la vie quotidienne (sketch)

Matériel pédagogique requis

- Ordinateur pour jouer des fichiers audio

Préparation

- Son **3**
- Copies de **M27**
- Copies de **M29**
- Exercice **M30**
- Exercice **M31**
- Exercice **M32**
- Copies de **M33**

Plan du cours

20 min Distribuez le dialogue **M29**.

Répartissez les élèves par groupes de deux et demandez-leur de lire le dialogue, puis de le traduire. Demandez à un binôme de le lire à haute voix puis de le traduire ligne par ligne. Aidez-les pour la traduction si nécessaire. Ensuite, demandez à ce binôme de jouer le dialogue sans le traduire. S'il vous reste du temps, vous pouvez demander à un autre binôme de jouer le dialogue.

5 min Récréation

10 min Distribuez l'exercice **M30**. Demandez aux élèves de compléter les phrases.

10 min Distribuez l'exercice **M31**. Demandez aux élèves de traduire les phrases.

10 min Pause

25 min Demandez aux élèves de s'entraîner à jouer le sketch **M27**. Les groupes jouent ensuite le sketch devant la classe.

5 min Récréation

10 min Distribuez l'exercice **M32**. Demandez aux élèves de compléter les phrases.

5 min Ensemble, chantez la chanson **Dek boteloj**.

Donnez les devoirs à faire à la maison.

M29 Dialogue

Maria Kiel vi sciis kie mi estas? Mi al neniuj diris kien mi iris.

Johano Kiam mi vidis ke vi ne estas hejme, mi demandis min, ĉu vi havas alian loĝejon.

Maria Kion vi diras?

Johano Mi scias ke vi ofte parolis pri iu loko kiu estas en parko. Estas nur unu tia loko en proksimo. Nia urba Parko. Tial mi iris tien.

Maria Bone vi faris. Sed ne estis mem komprenebla afero trovi ĉi tiun domon en la parko.

Johano Mi serĉis ĉie en la Parko. Mi marŝis sur iuj vojetoj kaj fotis fotojn por mia albumo. Jes mi marŝis longe, eble tri horojn kaj fine vidis vin.

Maria Mi ĝojas pro tio. Mi kuiras kafon kaj ni povos paroli pri ĉio. Kial vi volis vidi min?

Johano Mi ŝatas trinki kafon kun vi. Mi volis scii ĉu vi jam respondis en nia kurso al 1000 demandoj? Kaj mi venis diri al vi ke mi jam faris tion. Nun mi volas skribi al amiko en Brazilo por paroli kun li per skajpo.

Maria Tre bone. Mi ankoraŭ ne respondis al ĉiuj demandoj, sed mi rapidos por ankaŭ skribi al amikino, eble en Kanado.

M30 Exercice

Complétez les phrases.

En kiu lok _____ vi povas vid _____ mi _____ ?

Kia _____ aŭtoj portis grand _____ infanoj _____ inter du lokoj?

Malbel _____ domeg _____ star _____ en tiu strat _____ .

Li lern__ en lern _____ o kaj rigard _____ tra la pord _____ .

La instru _____ ino aŭskult _____ la bon _____ lernant _____ .

M31 Exercice

Traduisez en français.

Li sidiĝis sur la seĝo kaj tiam komenciĝis la filmo. Ĉu vi amikiĝis kun Petro kaj ĉu reboniĝis la situacio? Kial la manĝo malvarmiĝis? Mi aŭdis ke iuj geamikoj malsaniĝis. La aŭto rapidiĝis kaj ne plu estas videbla. Kiam ŝi endormiĝis, aŭdiĝis forta voĉo.

Kiam fermiĝis la pordo mi nenion plu vidis.

Miaj gepatroj geedziĝis antaŭ dudek jaroj.

M32 Exercice

Complétez les phrases.

Sur i_____ strato, iras policisto. K_____ li tenas je la mano? Ĉu ĉ_____ knabo estas malbon_____o?

Ana nen_____ prenas aferojn de aliaj homoj. Ŝi postkuris t_____ malbonulon kaj _____ ricevis la sak_____on.

K_____ vivas grand_____uloj? K_____ grandaj ili estas? T_____ gelernantojn ni revidas la trian fojon. Tiam ni fine komprenis, k_____ la instruistino refoje diris la parolon. Nen_____ malbonulo ŝatas lerni en lern_____o.

M33 Devoir à la maison

Créez des phrases à l'aide de l'ordinateur. Créez 5 phrases chaque jour. Traduisez-les et écrivez-les si elles sont correctes.

▼ **Unité 30** (sessions 59-60)



Objectifs pédagogiques

- Réviser les corrélatifs
- Revoir la grammaire des leçons précédentes

Matériel pédagogique requis

- ordinateurs pour les élèves (sauf si vous utilisez l'exercice alternatif)

Préparation

- Son **4**
- Copies de **M34**
- Exercice **M35**
- Copies de **M36**

Plan du cours

40 min Distribuez le dialogue **M34**.

Répartissez les élèves par groupes de deux et demandez-leur de lire le dialogue, puis de le traduire. Demandez à un binôme de le lire à haute voix puis de le traduire ligne par ligne. Aidez-les pour la traduction si nécessaire. Ensuite, demandez à ce binôme de jouer le dialogue sans le traduire. S'il vous reste du temps, vous pouvez demander à un autre binôme de jouer le dialogue.

10 min Pause

20 min Distribuez l'exercice **M35**. Demandez aux élèves de compléter les phrases.

5 min Récréation

20 min Jouez à d'autres jeux sur les corrélatifs. Divisez les élèves en deux groupes. Chaque groupe écrit la plus longue phrase possible avec le plus de corrélatifs possible, par exemple **En kiu lernejo iuj lernantoj neniam bone lernas kaj iuj lernantinoj, kiujn ni ne ĉiam vidas, ŝatas kanti iujn malnovajn kantojn kaj saluti ĉiujn sur ĉi tiu strato...**

Les groupes écrivent des phrases durant trois minutes puis les lisent à haute voix. Les autres groupes traduisent et notent le nombre de corrélatifs correctement utilisés.

Donnez les devoirs à faire à la maison.

M34 Dialogue

- Instruisto** Kie vi estis tiel longe? Mi sendis vin nur al proksima vendejo de libroj.
- Lernanto** Pardonu, instruistino. Mi vidis surstrate mian pli maljunan fratino, kiu iris al restoracio kaj diris ke ankaŭ mi iru kun ŝi.
- Instruisto** Kial vi iris kun ŝi, se vi sciis ke mi volas havi la libron el la vendejo kaj ke ankoraŭ estas lerneja tempo?
- Lernanto** La fratino havas naskiĝtagon kaj volis ke ankaŭ mi estu en la restoracio, kie manĝos miaj gepatroj kaj geamikoj de mia fratino.
- Instruisto** Ĉu via fratino ne scias ke estas tempo kiam vi devas lerni en la lernejo?
- Lernanto** Ŝi tion scias, sed ne povis trovi bonan tempon por ĉiuj. Mi tial iris kun ŝi.
- Instruisto** Kien vi metis la libron, kiun vi aĉetis por mi?
- Lernanto** Ĉi tie ĝi estas.

M35 Exercice

Complétez les phrases.

Kun ki _____ geamikoj Marko vidis ti _____ domojn? Ki _____ lecionojn vi lernis kaj kia _____ fotojn ili havis? Ĉu nen _____ vi trovis hejme? De k _____ revenis ti _____ homoj? Je ki _____ horo vi vizitos ti _____ malsanulojn? Ĉu ĉi _____ ĉambroj en ti _____ domo estas pura _____?

Per i _____ oni devas perlabori. Ĉiam homoj vivis en i _____ grupoj.

M36 Devoir à la maison

Créez des phrases à l'aide de l'ordinateur. Créez 5 phrases chaque jour. Traduisez-les et écrivez-les si elles sont correctes.